

Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

36-a Jarkolekto - Marto 2022 - N-ro 124

Andújar (Jaeno)



Januaro / Marto 2022

Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.
P. 06 Iznajar en la sudo de Kordovo.
 Ĉu alia Britio?
P. 11 ¿Tiene solución la crisis del
 asociacionismo esperantista?
P. 14 Lingva Angulo: el uso del
 adverbio.
P. 17 Nuntempa Vortaro.
P. 20 Poezia Angulo.
P. 21 Folioj por Praktikado.
P. 24 Turismi en ...
 Andújar (Jaeno).
P. 29 Notoj pri Esperanto kaj
 Andaluzio:
 La Laborista Lernejo de
 Kordovo.
P. 33 $E=mc^2$ Scienca Angulo:
 La Botiĥa Efiko.
P. 35 Flamenko:
 El Pali kaj la seviljanoj de la
 kortoj.
P. 37 Fervojista angulo:
 La kadiza "trambahía".
P. 39 Nun Ni. Junulara Paĝo.
P. 41 Komikso.
P. 48 Andaluzia kuirarto:
 Melongenoj kun melaso.
P. 50 Misteroj kaj Legendoj de
 Andaluzio: *Fantomo en la*
 Teatro Cervantes de Almerio.
P. 52 Vorto-ludoj.
P. 54 Humuro.

Gazeto Andaluzia

*Fundada por D. José Garzón Ruiz,
en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la Asociación
Andaluza de Esperanto.*

EDITA: Asociación Andaluza de
 Esperanto

REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D
 29013 Málaga (Hispanio)

DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López

REDACTORES:

José María Rodríguez Hernández
Alejandro Burgos Escalante

COLABORADORES:

Vicente Herrera Cobo

Juan García del Río

Lukas Toczki

Sur la kovrilo:

Turo de l' horloĝo en Andújar (Jaeno)

ESPERANTO EN ANDALUZIO

Fondita en la Universitato de Sevilo grupo de profesoroj favoraj al Esperanto.-

La pasintan 2-an de junio renkontiĝis unuafoje, ĵus kreita grupo de profesoroj de la universitatoj de Sevilo, kiuj deziras antaŭenirigi esperanton en tiuj centroj. Ĉeestis ses profesoroj, pliaj kvar ekskuzis sian ĉeeston. La celo de la grupo estas montri, ke esperanto povas esti utila instrumento por universitatoj, en agadkampoj kiel interŝanĝo de spertoj kun aliaj eduk-centroj en la mondo.

Tutcerte, dum la venonta kurso 2022/23 nova kurso de la internacia lingvo okazos en la Universitato de Sevilo kun la kunlaboro de Sevila Esperanto-Asocio kaj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.



D-ro Vicente Manzano Arrondo dum klaso de esperanto en la Universitato de Sevilo

Ĝenerala Kunsido de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.-

La pasintan 23-an de julio okazis la eksterordinara asembleo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, ĉi-jare la kunsido ne estis ordinara pro la fakto, ke estis necese nomumi aŭ renomumi la membrojn de la estraro de la asocio. Kiel tiu de la pasinta jaro, la kunsido okazis virtuale kaj malgraŭ la fakto, ke la

teknikaj kondiĉoj ne ebligis taŭgan komunikadon inter partoprenantoj, oni povis diskuti pri kelkaj aferoj. Tiel, oni decidis renomumi la nuntempan estraron, kiu pludaŭrigus sian laboron ĝis la jaro 2024. Ankaŭ oni proponis kunlabori kun Sevila Esperanto-Asocio rilate la organizadon de la venonta hispana kongreso de esperanto.

Ĵurnalo en Jerezo informas pri la historio de Esperanto en tiu urbo.-

La ĵurnalo *DIARIO DE JEREZ* dediĉis la pasintan monaton julio du paĝojn al la lingvo Esperanto kaj al la historio de ties movado en la urbo Jerezo. La artikolo ĉefe memoris la jerezan esperantiston Pedro Naranjo Terán (1887-1968), kiu ricevis omaĝon de la urbodomo en la jaro 2015 pere de la nomigo de strato kun la nomo "*Esperantista Pedro Naranjo Terán*". La inaŭguro de tiu publika spaco okazis kadre de la Andaluzia Kongreso de Esperanto de tiu jaro, okazinta en la urbo Jerezo.

La artikolo komenciĝas per la aserto, ke ne ekzistas nuntempe esperanto-movado en Jerezo. Ni aldonas, ĉu tiu situacio povus ŝanĝi kiel eble plej baldaŭ?





Unua renkontiĝo de la organizantoj de la venontjara Hispana Kongreso de Esperanto.-

Kiel anoncote sur la pasinta numero de nia revuo, la hispana kongreso de esperanto de la jaro 2023 okazos en la urbo Sevilo. La lokaj organizantoj jam decidis, ke la plej taŭga semajnfino por tiu kunveno estas tiu proksime al la 1-a de novembro. La organiza komitato jam kompencis pripensi kie okazigi la renkontiĝon kaj oni ekparolis pri la kultura programo de la kongreso.

Do, vi jam scias, rezervu en via agendo la unuan semajnfino de la monato novembro '23 por iri en Sevilon. Ni esperas vidi tie kiel eble plej grandan nombron da andaluziaj esperantistoj.



Partoprenantoj en la kunveno por organizi la Hispana Kongreso de Esperanto de la jaro 2023 en Sevilo

Iznájar, en la sudo de Kordovo

ĉu alia Britio?

Andaluzio jam estis celo de eŭropaj vojaĝantoj dum la 19-a jarcento, inter ili kelkaj britoj kiel Lord Byron, George Borrow kaj Charles Clifford. Tiutempe, oni parolis pri ekzota orienta lando plena je arabaj restaĵoj. Tiel, ili diskonigis tra la tuta Eŭropo la folkloron de Andaluzio. Ĉi ĉio, feliĉe, ne finiĝis en la 19-a jarcento, do, Andaluzio hodiaŭ ankoraŭ estas la fina celo en la vojaĝo de multaj eŭropanoj, ni ĉiuj scias pri la amasa ĉeesto de eksterlandanoj loĝantaj en la Suna Marbordo, tuj apud la Mediteranea Maro.



Eksteraĵoj ĉirkaŭ la Moskeo en Kordovo, laŭ gravuraĵo de la franca Gustavo Doré de 1862

Sed ne ĉiuj eksterlandanoj en Andaluzio loĝas en la kosmopolita Suna Marbordo. Ankaŭ en la mezo de Andaluzio estas eble trovi tiujn, kiuj venis de aliaj eŭropaj landoj por ĝui nian landon. Unu el tiuj lokoj estas la vilaĝo Iznájar (prononcu: Iznáhar) en la kordova provinco. En ĉi tiu malgranda urbo kaj en ties ĉirkaŭaĵoj loĝas pli ol 4.100 eksterlandanoj, la plejmulto el ili britoj.

Preskaŭ ĉiuj ili alvenis en la sudon de la kordova provinco pro la kvieta etoso de tiu zono. Meze de Iznájar troviĝas granda baseno, la plej granda de Andaluzio kaj la ĉirkaŭanta montaro igas ke, la pejzaĝoj de tiu regiono estas iomete similaj al tiuj de Skotlando. Kompreneble la vivo-kostoj estas pli malaltaj ol tiuj de Britio, tio ja estas alia allogaĵo de la zono.



Iznájar, fone la impona baseno

Britoj en Iznájar emas aĉeti forlasitajn kampar-domojn, kies posedantoj -la plejmulto el ili, idaro de la kamparanoj kiuj starigis tiujn konstruaĵojn- vendas tiujn proprietaĵojn kontraŭ malalta prezo. Ili rekonstruas tiujn antikvajn domojn meze de la kamparo kaj ili provizas tiujn konstruaĵojn per ĉiuspecaj komfortaĵoj. Kompreneble, la hispanaj enloĝantoj bonvenigas tiujn novajn najbarulojn kaj, tiel, la municipaj laboristoj de Iznájar devis sekvi rapidan kurson de la angla lingvo por helpi la novajn enloĝantojn. Siafoje, oftas vidi la britanojn promenante tra la stratoj de la vilaĝo kun angla-hispana vortaro enmane. Eĉ unu el la lokaj politikaj partioj eldonis sian politikan programon en la angla lingvo okaze de la municipaj balotadoj por informi la novajn najbarulojn, kiuj kiel membroj de la Eŭropa Unio rajtis voĉdoni en tiuj balotadoj. Bedaŭrinde tiu rajto nuliĝis post la brita eliro de la Eŭropa Unio.

En la monato aŭgusto 2022 la Urbodomo de Iznájar organizis renkontiĝon de la britaj najbaruloj, kun la celo koni ankaŭ kiujn spertojn ili deziras travivi en sia nova urbo, temis pri la *"I International Get-together Iznájar 2022"*

(1-a Internacia Kunveno Iznájar 2022). Tiam, la urbestro bonvenigis ilin, poste kvar britaj virinoj rakontis kial ili deziris veni en la sudon de la kordova provinco. Fine, okazis ronda tablo por sciigi pri iliaj bezonoj, deziroj kaj eblaj kontribuoj de la brita kolonio en Iznájar.



Partoprenantoj en la 1-a Internacia Kunveno Iznájar 2022

Kaj kio rilate la lingvan komprenadon? Nu, kvankam estas ofte vidi britanojn en trinkejoj aŭ publikaj lokoj de la vilaĝo, verdire ili nur rilatas inter si. Unu el iliaj plendoj estas la fakto, ke en Hispanio la ĉefaj rilatoj okazas ĉirkaŭ la familioj, do estas malfacile eniri en hispanlingvajn etosojn se ili ne havas hispanajn familianojn. Tamen, ili asertas, ke estas pli facile kontakti en la hispana lingvo ĉi tie en Iznájar ol en la Suna Marbordo, ĉar ĉe la internacia etoso de tiu zono ne oftas uzi la hispanan lingvon, kompreneble tio ne okazas en vilaĝo de Kordovo.



Vendejo en la vilaĝo, ankaŭ kun anglalingva indiko
"Supermarket"

La kunloĝado de britanoj inter hispanoj en Iznájar sendube alportas avantaĝojn por ambaŭ komunumoj. Krom pli trankvilan vivon, britanoj ankaŭ establis negocojn por venigi britajn turistojn en Iznájar, tiel kelkaj el la kampar-domoj rekonstruitaj de britanoj ankaŭ utilas kiel turismaj rezidejoj kiuj estas dise propaganditaj en Britio. Alie, enloĝantoj de Iznájar, ĉefe la plej junaj, povas rekte uzi la anglan lingvon kiu estas parolata, kiel ĉiutaga lingvo, de pli ol 4.000 homoj en tiu vilaĝo, tio estas la 15% el la tuta enloĝantaro. Tiel, la loka radio-elsendejo "*Radio Iznájar*" havas angla-lingvan programon, kies respondeculoj estas studentoj de la loka gimnazio.



Anglalingva informo pri menuo en restoracio en Iznájar

Bedaŭrinde nenion bonan alportis la Britirola, tio estas la brita eliro de la Eŭropa Unio, al la brita enloĝantaro de Iznájar. La membriĝo de kaj Hispanio kaj Britio al la EU certigis la efektivigon de samaj rajtoj por britaj civitanoj en nia lando, tamen la nova situacio, kun Britio for de la Unio, provokas, ke la situacio de britoj en Hispanio devas esti regulita de ambaŭ-flankaj traktatoj inter ambaŭ ŝtatoj. Antaŭe, ĉiuj titoloj aŭ rajtigiloj de britoj en Hispanio estis aŭtomate agnoskitaj, nuntempe ne, inter ili la plej grava, estas la stir-licenco de britoj en Hispanio, kies valideco en Hispanio jam ne estas garantiata kiel eŭrop-unianoj, tiel estos necese subskribi akordon ĉi-rilate. Same okazas rilate la socialan kaj kuracistan prizorgadon. Tamen, tio ne estas obstaklo kaj britoj, kiel ceteraj eksterlandanoj, estas varme akceptataj en ĉi tiu regiono de Andaluzio.

ALIĜU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: cordoba@esperanto.ac
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Caixabank ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:
- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2022 aŭ 2023.



HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Si deseas colaborar en la difusión de la lengua internacional en Andalucía, aquí tienes tu asociación.

.Para hacerse socio contacta con: cordoba@esperanto.ac
Cuota anual: 20 € que se pueden abonar en la cuenta siguiente:

- Caixabank ES74 2100 7234 6713 0048 0698

Cuando pagues por favor informa de los siguientes datos:
- Nombre del socio.
- Concepto: Cuota 2022 o 2023.

¿Tiene solución la crisis del asociacionismo esperantista?

Hay quienes achacan a las crisis económicas, que con más o menos intensidad se vienen sucediendo desde el año 2008, el hecho de que cada vez menos personas se afilien a los colectivos existentes en la sociedad civil. De este modo, las asociaciones en los últimos años han notado una caída espectacular en el número de socios, así como en el interés por desarrollar tareas en su seno.



La evolución de los miembros individuales de la Asociación Universal de Esperanto también muestra un decrecimiento en los últimos años,

Es cierto que esta situación no solo se produce en las asociaciones esperantistas. Así, una organización no-gubernamental que tiene su campo de actuación a nivel mundial como *Greenpeace*, tuvo que despedir hace años en España a 16 de sus empleados, por el drástico descenso del número de asociados. Pero claro está, esta asociación declara tener en España 100.000 socios que pagan sus cuotas, una situación que el movimiento esperantista en nuestro país no puede llegar ni a imaginar.


Pero seamos realistas, al menos en lo que respecta al asociacionismo esperantista esta situación viene de más lejos y no tiene sólo un componente económico. ¿Entonces, cuál es la causa? Es verdad que la economía puede ser una de ellas, ya que es lógico que muchas personas prefieren destinar el dinero con el que se abonan las cuotas de una asociación a otras cuestiones más necesarias.

Sin embargo también se puede afirmar, que en los últimos años los esperantistas nos hemos vuelto individualistas y convertido en meros espectadores de lo se *cuece* en la movado. Aprendemos la lengua y queremos de vez en cuando leer algún libro, que otro habrá escrito; queremos participar en encuentros, que otros han organizado y queremos saber de la actualidad del esperanto gracias a publicaciones, que otros han editado. Así que son muy pocos los que, generalmente desde asociaciones, se vuelcan en editar libros, revistas y organizar encuentros.

Hay quien opina que realmente no se trata de un exceso de individualismo, sino de que nos hemos aislado con internet. Es decir, y parafraseando a *Buggles*, el mítico grupo inglés de comienzos de los '80, puede haber ocurrido que *Internet ha matado a la estrella de los clubes*. Se aprende esperanto de manera autodidacta a través de la red y luego se busca lo que alguien hace a nuestro alrededor, si es que queremos practicar la lengua internacional charlando con otras personas. Pero cuando se contacta con ese pequeño grupo la implicación suele ser nula y si se participa en alguna actividad es porque, de nuevo, otros lo han organizado.

Sin embargo, puede parecer una paradoja, pero cuando alguien aprende esperanto autodidácticamente por internet y contacta luego con una asociación esperantista, las primeras preguntas que surgen son "*¿Dónde os reunís? ¿Cuándo os juntáis para hablar?*" Por eso, Internet es sin duda una buena manera de aprender la lengua internacional, sin necesidad de atarse a un horario y sin tener que hacer desplazamientos, pero para practicar el idioma hay pocos recursos tan efectivos como hablarlo con otra persona.

A comienzos de los '80 el grupo Buggles decía que el vídeo mató a la estrella de la radio. ¿Internet ha matado también a las asociaciones?



Lo que está claro es que si existe un problema es necesario encontrar una solución, pero también es verdad que si el problema tiene varias causas, entonces habrá que seguir varias vías para solucionarlo.

- *Solución económica.* Las cuotas deben dejar de ser la única fuente de financiación de las asociaciones esperantistas. Tenemos que ser más profesionales y presentar peticiones para conseguir algunas de las múltiples subvenciones que las administraciones locales y autonómica ofrecen para el tipo de asociaciones en las que podemos tener un perfecto encaje. Del mismo modo, tenemos que solicitar que nuestras asociaciones sean declaradas de utilidad pública, a los efectos de hacer más atractivo a efectos fiscales, el pago de cuotas por parte de los asociados.

- *Propuestas atrayentes.* En la mayoría de las ocasiones la única contrapartida que se le ofrece al asociado es la recepción de un boletín informativo más o menos atractivo. Resulta necesario incrementar las actividades en las que el miembro de una asociación pueda participar, teniendo también el objetivo de practicar y perfeccionar el conocimiento de la lengua. Para ellos resultaría una buena idea la organización de excursiones a lugares de interés de Andalucía. Esta experiencia ya se ha puesto en práctica en el seno de la Asociación Sevillana de Esperanto, organizando visitas a monumentos y lugares de interés de la ciudad de Sevilla y el resultado ha sido más que aceptable.

- *Incrementar y mejorar la presencia en la red.* Tenemos que aceptar que en gran proporción, los nuevos interesados en el esperanto van a venir gracias a internet y que incluso, va a ser gracias a alguna página donde van a aprender de manera básica la lengua. Resulta necesario hacer más atractiva la presencia de nuestras asociaciones en internet, naturalmente no se trata de aspirar a contar con una página que pueda compararse con la de una gran empresa, pero sí al menos que demuestre que se trata de una asociación viva.

En resumen, si queremos conseguir un resultado distinto al que tenemos ahora en relación a la participación de los esperantistas en las asociaciones que promueven y difunden la lengua internacional, no podemos seguir repitiendo las mismas actuaciones que hemos llevado a cabo hasta ahora. Tenemos que plantearnos unos objetivos simples y a pequeña escala, pero factibles, siendo conscientes claro está de que difundir el esperanto no es nuestra profesión, ni vamos a ganar dinero con ello, pero sí es una tarea que encaja perfectamente en el lema de "*Piensa globalmente y actúa localmente*".

Lingva Angulo

El uso del adverbio



Ya sabemos que en esperanto los adjetivos terminan en "-a" y tienen como función calificar o señalar una característica de una persona, de un animal o de una cosa. Así decimos:

- *Vi estas alta*
Tú eres alto
- *Ŝi estas inteligenta*
Ella es inteligente
- *Mia riĉa najbarulo aĉetis blankan aŭtomobilon*
Mi vecino rico compró un automóvil blanco

En estas frases las palabras *alta*, *inteligenta*, *riĉa* y *blanka* son adjetivos, terminan en "-a" y han servido para calificar a algo o a alguien.

Pero ¿Qué ocurre cuando queremos calificar o señalar una característica de un verbo o de una frase entera? Veamos estos ejemplos:

- Caminar durante una hora es bueno.
- Es terrible que no hayas podido hacer el examen.

En estos casos estamos señalando una característica de la acción de caminar y de una situación concreta, el que no hayas podido hacer el examen. ¿Utilizaríamos también un adjetivo para calificar al verbo y a la frase? No, en esperanto en estos casos debemos usar un adverbio, que como recordarás terminan en "-e". Ese es el significado de la palabra *adverbium* en latín, lo que está junto al verbo.

Así diríamos:

- Caminar durante una hora es bueno.
Promenadi dum unu horo estas bone.
- Es terrible que no hayas podido visitar la ciudad.
Estas terure, ke vi ne povis viziti la urbon.

Para indicar una característica de una persona, de un animal o de una cosa usaremos un adjetivo "-a".

Fajro estas danĝera

Para indicar una característica de un verbo o de una frase usaremos un adverbio "-e".

Ludi per fajro estas danĝere

Usaremos también el adverbio "-e" cuando no exista sujeto, son las frases impersonales. Por ejemplo:

- Llueve mucho • Hace frío
Pluvas multe Estas malvarme

No confundamos este tipo de frases con aquellas en las que el sujeto no aparece, pero sí existe. Por ejemplo en:

- ¡Sé valiente! La traducción sería: *Estu kuraĝa!*

La frase en español tiene sujeto, aunque no aparezca, así sería: ¡Tú sé valiente!

Igualmente utilizaremos el adverbio si queremos calificar no sólo un verbo, sino una frase entera. Ejemplos:

- *Estas terure, kiam infanoj mortas dum milito.*
Es terrible cuando mueren niños en la guerra.
- *Estos sufiĉe, se vi donas al mi glason da akvo.*
Será suficiente si me das un vaso de agua.
Bastará con que me des un vaso de agua.
- *Estus bone, ke vi povus veni kiel eble plej baldaŭ.*
Sería bueno que pudieras venir lo antes posible.

El adverbio también se utiliza en esperanto para indicar la dimensión a la que se refiere una medida. Por ejemplo:

La konstruaĵo mezuras kvin metrojn laŭalte.
La construcción mide cinco metros de alto
(literalmente: "cinco metros según altura")

Je 50 decibeloj laŭte sono estas ĝena.
A 50 decibelios de alto un sonido es molesto.

También usaremos el adverbio (-e) en construcciones como:

- *Rilate tion / Rilate al tio:* En relación a eso
- *Pere de:* Por medio de
- *Kaŭze de:* A causa de
- *Fare de:* Por parte de

Kion vi opinias rilate al la lasta libro de la aŭtoro?
Kion vi opinias rilate la lastan libron de la aŭtoro?
¿Qué opinas en relación al último libro del autor?

Usaremos también el adverbio en comparaciones antes de "kiel" y "ol".
Veamos algunos ejemplos:

Mi opinias same kiel vi.
Yo opino lo mismo que tú.

Li laboras nun pli efike ol la pasinta jaro.
Él trabaja ahora más eficazmente que el año pasado.

Por último, usaremos también el adverbio cuando tengamos que calificar un adjetivo. Por ejemplo, en la frase "tú tienes los ojos azul claro", "claro" se refiere al color azul, que a su vez es un adjetivo que califica a los ojos. En esperanto diríamos:

Vi havas hele blujajn okulojn

aunque también podría decirse
Vi havas hel-blujajn okulojn



NUNTEMPA VORTARO

MARA POLUADO



Petrol-ŝipo




Tren-ŝipo



Akcidento



Skafandristo



Babordo

Pruo

Tribordo

Pobo



Sinkigo (hundimiento)



**Agad-plano por eventualaĵoj
(Plan de Contingencias)**



Mazuto (Fueloil)



Likado (*Fuga*)



Gas-šipo



Forfluo (*Derrame*)



Retena baro
(*Barrera de Contención*)



Batiskafo



Sav-šipo
(*Buque de Salvamento Marítimo*)



Šargažo
(*Carga del buque*)



Vrako (*Pecio*)



Hidrokarbono
(*Hidrocarburo*)



Pumpado
(*Bombeo*)



Verŝado (*Vertido*)



Elpreni fuelon
(*Extraer combustible*)



Gudro
(*Chapapote*)



Sorbanto
(*Material absorbente*)



Fendo en ŝip-flanko

(*Fisura en el costado del barco*)



Nigra tajdo
(*Marea negra*)



Kovrado de fendoj
(*Sellado de grietas*)



Aŭtomata senfueligilo
(*Skimmer o Desnatador*)



Lubrik-oleo
(*Aceite lubricante*)




Poluado
(*Contaminación*)



Poluanta reziduo
(*Residuo contaminante*)



Mediaj sekvoj
(*Impacto medioambiental*)

LA MALFIDELA EDZINO

Ĉar mi kredis ŝin fraŭlino
al river' mi kun ŝi iris,
sed ŝi estis jam edzino.
Estis en Jakoba nokto
kaj pro kvazaŭ kompromiso
la lanternoj estingiĝis
kaj ekĉirpis arde griloj.

Ŝiajn mamojn mem dormintajn
palpis mi ĉe stratofino
kaj subite ili floris
kvazaŭ hiacinta spiko.

La subjupo amelita
sonis kiel pec' da silko
same kiel sonas ŝtofo
kiun ŝirus dek tranĉiloj.

Sen arĝentolumaj ludoj
arboj kreskis en fikcio
kaj hund-horizonto bojis
ĉe la transrivera nigro.

Preter la rubusoj, junkoj,
dornoplantoj kaj vepr-pikoj
faris mi sub ŝiaj haroj
etan foson sur la ŝlimo.

Mi demetis la kravaton,
ŝi la bluzon de virino,
mi la revolvero-zonon,
ŝi gajnojn el pur-silko.

Ne troveblas fajna haŭto,
nek konketoj, nek lilioj,
nek kristaloj kun lunlumo
helas kun pli granda brilo:
ŝiaj kruroj el mi fuĝis
kiel fiŝo je surprizo,
la duono ŝajne brulis
plena la duon' de frido...

Mi trakuris tiun nokton
per brilperla ĉevalino
la plej belan el la vojoj
sen la selo kaj sen bridoj.

Mi, ĉar viro, ne konfesos
kiaj estis ŝiaj diroj,
lum' el saĝ' kaj diskretemo
diktas al mi prudentiĝon.

Ni forlasis la riveron,
ŝin malpuris sabl' kaj kisoj,
ja batalis kontraŭ l' vento
blankaj glavoj de l' iridoj.

Mi kondukis laŭ mi estas:
kiel vera ciganido,
silkan kudrilujon flavan
donis mi al ŝi kun digno.

Kaj ne volis mi ŝin ami,
ĉar estante jam edzino
ŝi survoje al rivero
deklaris min trompe fraŭlino.



Folioj por Praktikado

MANNEKEN PIS - VIRETO PISANTA

Antaŭ multaj jarcentoj urbo Burselo estis en danĝero. Estis milito. La malamikoj de la urbo volis **eniri en la urbon**. Ili intencis meti **eksplo digilon** ĉe pordego en la muro de la urbo. Malgranda knabo vidis la bombon kaj li tuj pisis **sur la meĉon**. La eksplodo ne okazis. Tiel, la knabeto savis la tutan urbon. La urbanoj, **kiel dankemo**, starigis statueton por omaĝi tiun knabon, jen la origino de *Manneken Pis* (Vireto pisanta).

La artisto, kiu faris ĝin, nomiĝis Jerome Duquesnoy. **Se vi vidus la statuon** sen vestoj, vi vidus, ke ĝi estas vera artaĵo, **pli bela sen la vestoj ol kun ili**. Por bruselanoj la statuo *Manneken Pis* signifas vivon kaj bonajn rilatojn inter bruselanoj kaj belgoj. Alta metala barilo **ĉirkaŭas** ĝin, **tiel ke neniu povu** tuŝi aŭ forpreni ĝin.

Malgraŭ tio, vandaloj rabis la statuon en la jaro 1960-a, vere tiu **fiagado** kontribuis plifamigi la statuon. Post **kelke da tempo** oni rekuperis la statuton, tiam la aŭtoritatuloj metis ĝin en la Muzeo de la urbo Bruselo, do, tiu kiu troviĝas sur strato de la urbo reale estas kopio de la originala statuo.

> eniri en la urbon

Recuerda que el acusativo también se puede usar para indicar movimiento, se denomina "acusativo de dirección". El uso del acusativo de dirección tras la preposición "en" indica que ese es el destino final adonde se dirige el movimiento. Así "*eniri en la urbon*" se traduciría por "entrar en la ciudad".

> eksplodigilon

Nos encontramos con el acusativo de "*eksplodigilo*", cuyo significado es "explosivo". Se trata de un término que está formado por verbo+2 sufijos. El primer sufijo es "*-ig*", que significa "hacer lo que indica ese verbo". De este modo "*eksplodigi*" sería hacer explotar, hacer estallar. El otro sufijo es "*-il*", cuyo significado es "instrumento para hacer algo". Así, "*eksplodigilo*" literalmente significaría "instrumento para hacer estallar", "explosivo".

> sur la meĉon

De nuevo nos encontramos con un acusativo de dirección, pero en este caso no le antecede la preposición "*en*", sino "*sur*" (sobre). Literalmente significa "sobre la mecha", pero en esperanto además se indica la idea de que hay un movimiento. Claro está, el pis del chico usado para apagar la mecha, estaba en movimiento y además provenía desde arriba.

> kiel dankemo

Literalmente significa "como agradecimiento". Nos encontramos con el sufijo "*-em*" que se usa para indicar que "tendencia a lo que indica el verbo". En este caso el verbo es "*danki*" (agradecer), por lo que "*dankemo*", sería "tendencia a agradecer", es decir "agradecimiento".

> Se vi vidus la statuon

En español usaríamos el subjuntivo en esta frase, así diríamos "si tú vieras la estatua". Pero en esperanto se usa el condicional. Recuerda que el condicional de los verbos se forma con la terminación "*-us*". Es lógico usar el modo condicional, porque la frase comienza con la preposición "*se*", que significa "si" y eso ya da a entender una condición: "si...entonces..."

> pli bela sen la vestoj ol kun ili

Siempre ponemos como ejemplo de comparativo, frases como "él es más... que...". Pero no tiene que ser siempre esa construcción. En este ejemplo indicamos que "es más bella sin los vestidos que con ellos".

> ĉirkaŭas

Este verbo es un ejemplo de que se pueden formar verbos de cualquier palabra. En este caso de la preposición "*ĉirkaŭ*" (alrededor de). Así, el verbo "*ĉirkaŭi*" significaría "rodear", "estar alrededor".

> **tiel ke neniu povu**

"*Tiel ke*" significa "de manera que" y le sigue el verbo en subjuntivo, que en esperanto se forma como el imperativo "-u". La traducción sería "de manera que nadie pueda".

> **Malgraŭ tio**

En esperanto "*malgraŭ*" es una preposición que significa "a pesar de". La traducción sería "a pesar de eso".

> **Fiagado**

Recuerda que en esperanto usamos sufijos y también prefijos. En este caso nos encontramos con el prefijo "*fi-*", que se usa para indicar que nos encontramos ante algo "censurable, no deseado, malo". Así la traducción de "*fiagado*" sería "acción censurable" o "mala acción".

> **Plifamigi**

Ya hemos visto que el sufijo "*-ig*" significa "hacer...". El verbo "*famigi*" se traduce por "hacer famoso". En el texto aparece unido a la partícula "*pli*", que expresa algo en un grado superior. De este modo "*pli famigi*" significaría "hacer más famoso". Podríamos también haber usado "*pli famigi*", "*famigi pli*" o incluso "*famigi plie*".

> **Kelke da tempo**

Recuerda que usamos el adjetivo "*kelka*" (algún, alguno) cuando se trata de objetos que se pueden contar, ejemplo:

- *Vi havas kelkajn librojn en via biblioteko.*

Tú tienes algunos libros en tu biblioteca.

Como los libros es algo contable usamos "*kelka*". Pero cuando se trata de algo incontable se usa "*kelke da*", literalmente "algo de". En el ejemplo del texto nos referimos al tiempo. Es cierto que el tiempo se puede contar en horas, minutos, segundos... Pero en este caso se ha querido dar la idea de que no se trata de un tiempo calculado con exactitud, sino que es "algo de tiempo", "*kelke da tempo*". Si el autor hubiera querido dar más exactitud a ese período de tiempo, podría haber usado: "*kelkajn jarojn poste*" (algunos años después).



Norde de Andaluzio, tuj apud Kastilio-Manĉo, troviĝas tre antikva urbo, piede de Siero Morena kaj trairita de la rivero Gvadalkiviro, temas pri Andújar, (prononcu: Andúhar), en la provinco Jaeno.

En apudaj zonoj, tie kie sidejis unue Andújar, oni eltrovis restaĵojn de la Bronza Epoko. Sendube, la unuaj enloĝantoj ekspluatis la terkulturajn rimedojn de la zono kaj ili ankaŭ profitis la mineralan riĉecon de tiu regiono. La iberoj fondis tiun unuan setlejon, kiu ricevis la nomon *Isturgi*.

Blazono de Andújar



Ili havis kontaktojn kun turdetanoj (alia ibera popolo), fenicoj, grekoj kaj kartaganoj. Romianoj fondis *Municipium Isturgi Triumphale*, konata dum la 1-a kaj la 2-a jarcentoj p.K., pro la ceramikaĵoj tie ellaborataj. Ja, la apuda rivero Gvadalkiviro akvumis teron taŭgan por la ceramiko.


Kiam la araboj eniris en la Iberan Duoninsulon, en la jaro 711-a, la enloĝantoj de la setlejo *Isturgi* translokiĝis al loko kie nuntempe troviĝas Andújar. Tiu nova vilaĝo ricevis la nomon "*Anduyar*". Tio okazis en la jaro 853. Dum la 12-a jarcento la araboj, de la almohada popolo, konstruis muregon por defendi la urbon. En la jaro 1225, la araba emiro de Baezo *Al-Bayyasi* cedis la urbon al la kristana reĝo Ferdinando la 3-a. Andújar fariĝis tiam la centra loko por renkontigi la armeojn kiu luktis kontraŭ araboj en Andaluzio. En la jaro 1446 la kastilia reĝo Johano la 2-a atribuis urban titolon al Andújar.

Dum la 16-a jarcento, Andújar jam estas granda urbo kun preskaŭ 15.000 enloĝantoj, kies viv-rimedoj estas bruto-bredado kaj ter-kulturado, ĉefe

la produktado de tritiko. Estis ankaŭ tre grava la ellaborado de fera ilaro kaj bredado de silko-raŭpoj. Meze de la 18-a jarcento, la reĝo Karolo la 3-a instigis la alvenon de mez-eŭropaj kolonianoj, kun la celo repopoli senhomajn zonojn de Siero Morena. Andújar jam estis la plej grava tiea urbo, tiel proksime aperis aliaj vilaĝoj kiel La Carolina, kun mez-eŭropaj enmigrintoj. Tiuj novaj vilaĝoj faciligis la vojaĝojn inter Madrido, Sevilo kaj Kadizo, la tiel nomata "Reĝa Vojo", Andújar troviĝis meze de tiu vojo. En la jaro 1788 oni instalas en la urbo reĝan poŝt-oficejon.

trupoj venkis en Bailén, la unua malvenko de la imperiestro Napoleono. La franca generalo subskribis kapitulacion en palaco de la urbo Andújar. En la jaro 1823, la reĝo Ferdinando la 7-a, en sia vojaĝo de Kadizo en Madrido post malvenko de liberalisma ribelo, subskribis la Dekreton de Andújar, kiu celis puni tiujn kiuj kunlaboris kun la konstitucia liberalisma reĝimo.

Jam en la 20-a jarcento, la civila hispana milito estis speciale terura en Andújar. La urbo restis fidela al la respublika registaro, tamen ribelintaj



Sanktejo de la Virgulino de *La Cabeza*, pinte de la monteto "*El Cabezo*"

En la jaro 1808, post la invado de Hispanio fare de la napoleona armeo, la franca generalo Dupont lokis en Andújar la ĉefstabejo de la franca armeo en la sudo de Hispanio. De tie eliris la franca armeo kiun la hispanaj

trupoj staris garnizonon en la Sanktejo de la Virgulino de la *Cabeza*, impona konstruaĵo sur monto proksime al Andújar. Post kelkmonata rezistado fine la ribelintaj trupoj kapitulacis. Multaj el ili, kaj tie troviĝantaj

familianoj mortis.

Hodiaŭ, Andújar estas urbo kun 36.000 enloĝantoj, unu el la plej granda en la jaena provinco. La ĉefaj viv-rimedoĵoj estas la produktado de oliv-oleo, cerealoj kaj kotono. Alia grava ekonomia resurso estas ĉasado, okazanta en la Natura Parko de la Siero de Andújar, kiu troviĝas proksime al la urbo.

Festoj

Ĉiuj jaroj, la lasta dimanĉo de la monato aprilo, okazas amasa pilgrimado al la Sanktejo de la Virgulino de la *Cabeza*. Temas pri la plej antikva pligrimado en Hispanio kaj laŭ kalkuloj, pli ol unu miliono da homoj partoprenas en ĉi tiu festo. Centoj da ĉaroj kun pilgrimantoj akompanas la procesion de la Virgulino, kiu estas konata kiel "*La Brunulineto*". La marŝado okazas ene de natura parko.

La 2-an de februaro okazas la festo de la kandeloj. Tiam, najbaruloj bruligas sur-strate herbajn restaĵojn post la oliv-rikolto. La celo estas atingi personan purigadon kaj tiel ankaŭ la sopiratajn celojn.

La somera foiro de Andújar okazas en la monato septembro. Ĝi okazas depost la jaro 1801, kiam terkulturistoj kaj brutar-bredistoj renkontiĝis por vendi kaj aĉeti produktojn. Nuntempe temas pri tipa andaluzia foiro. Koincide kun la foiro okazas *Anducab*, tie la ĉevaloj estas ĉefroluloj en ekspozicioj, spektakloj, ktp.

La 1-an de novembro, familianoj kaj grupoj de amikoj renkontiĝas en kamparaj festoj por memori amikojn kaj familianojn jam forpasintaj.

Pilgrimado de la Virgulino de "La Cabeza", dum la lasta dimanĉo de la monato aprilo.



Monumentoj

- Palaco Niños de don Gome

Konstruita inter la jarcentoj 17-a kaj 18-a. La faŝado estas tipe renesanca, elstariĝas du grandaj skulptaĵoj virfiguraj sur ambaŭ flankoj de la enir-pordo. Nuntempe, tie troviĝas la Arkeologia Muzeo de la urbo kaj ekspozicio pri ceramikaĵoj.



- Preĝejo de Sankta Maria

La antikva islama moskeo, post la konkero de Andújar fare de la kristana kastilia reĝo, fariĝis kristana preĝejo en la jaro 1228. La nuntempa konstruaĵo komenciĝis dum la gotika epoko, kvankam ĝi finiĝis laŭ renesanca stilo.

Ene de la preĝejo estas eble vidi altvaloran pentraĵon de *El Greco* (1541-1614), temas pri "Jezuo preĝas en la olivarb-korto".

- Turo de la horloĝo

Tie kie stariĝis minareto de la antikva moskeo, en la jaro 1534 oni konstruis turon. Sur ĝi aperas blazono de la imperiestro Karolo la 1-a kaj sur alia flanko tiu dela familioj *Trastámara* kaj de *Habsburgo*.

- Sanktejo de Sankta Maria de la Cabeza

Sur la pinto de monto, je 30 kmoj de la urbo Andújar, ĉirkaŭgita de belega natura parko, stariĝas la sanktejo de la Virgulino de *la Cabeza*. La nomo signifas "la kapo" kaj ĝi rilatas al la monto kie en la jaro 1227 paŝtisto trovis kaŝitan figuron de la Virgulino Maria. Inter la jaroj 1287 kaj 1308 sur la pinto de tiu monto stariĝis la primitiva sanktejo, poste reformita en la 16-a jarcento.

Ene de ĝi troviĝis tiu figuro trovita hazarde de la paŝtisto. Depost la 15-a jarcento okazas tie unu el la plej multnombra, kaj sendube la plej antikva, pilgrimado en Hispanio. Kiel dirite, dum la hispana civila milito, en la jaro 1936, ducento da civil-gvardioj kaj iliaj familioj, kiuj apogis la ribelon de kelkaj militistoj kontraŭ la respublika registaro, restis garnizone en la sanktejo, pro la fakto, ke la aŭtoritatuloj ne apogis la puĉon de la generaloj.

La respublika armeo sieĝis la sanktejon, kiu ricevis provizojn de aviadiloj flugantaj el la urbo Kordovo, kiu ankaŭ apogis la ribeladon. Okazis tiam dek-monata luktado kiu preskaŭ detruis la sanktejon. Dum tiuj luktoj la primitiva figuro de la Virgulino perdiĝis aŭ detruigis. Fine, en la monato majo de 1937 la respublika armeo konkeris la sanktejon. Post la milito oni rekonstruis la sanktejon, kiu nuntempe estas vizitata de miloj da homoj. Same, en la jaro 1944 skulptisto ĉizis novan figuron de la Virgulino.

Kiel dirite la sanktejo troviĝas meze de mirinda natura parko, pinte de monto. Sendube vizitinda loko.

Gastronomio

Pro la abunda montara riĉeco de Andújar, la kuir-arto de la urbo baziĝas sur sovaĝaj ĉasad-bestoj, kiel aprino, cervo, perdriko aŭ sovaĝaj kunikloj. Tiuj viandoj estas frititaj kun alt-kvalita oliv-oleo de la zono kaj kondimentitaj kun papriko, laŭro, origano ktp.

Dum la festo de la 1-a de novembro, oni ellaboras bongustan dolĉan farunaĵon.

Venontnumere

Turismi en ...



OLIVARES (Sevilo)



Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.

La Laborista Lernejo de Kordovo

Komence de la 20-a jardeko fondiĝis en Kordovo la "Escuela Obrera" (Laborista Lernejo). Ĉi tiu nova instrua institucio estis kreita sub la aŭspicio de la kordovaj laboristaj societoj de lignaĵistoj, gasistoj, elektristoj, kelneroj, kuiristoj kaj tiu de metalurgiistoj. La celo de la Laborista Lernejo estis havigi sufiĉe bonan instruadon al la laborista idaro, bedaŭrinde en la tiutempa hispana socio la filoj de la proletara klaso apenaŭ ĉeestis la lernejojn, ĉar ili devis eklabori kiel eble plej baldaŭ por kunlabori en la familia ekonomio.

La lernejo ekzistis dank'al la kontribuo de la laboristaj societoj, la ekonomia apogo de la tiel nomataj "protektantoj" kaj, de tempo al tempo, de municipaj subvencioj. Kvankam ĉi tiu lasta mon-helpo ne ĉiam estis aprobata, tio dependis de la politika idearo de la Urbodomo. Tiel, en la jaro 1914, la municipaj aŭtoritatuloj petis al la regantoj de la lernejo enirigi la studobjekton "Katolika Doktrino", nur tiel la lernejo povus ricevi subvencion de la Urbodomo. Verdire la "Laborista Lernejo" estis la unua eduka centro ne dependanta de la katolika eklezio aŭ



Lernantoj kaj instruistoj
en la Laborista Lernejo
de Kordovo.

oficialaj instancoj. En la 2-a jardeko estis nomumita direktoro de la lernejo Eloy Vaquero Cantillo. Li estis kordova instruisto tute favora al novaj pedagogiaj teorioj. En la jaro 1910, Eloy Vaquero aliĝis al Radikala Respublika Partio, en tiuj jaroj li ankaŭ defendis la ekonomian georgistan teorion. En 1913, li kaj aliaj kunuloj de la Radikala Partio ekigis agrikulturan komunumon en sia naskiĝ-vilaĝo, Montalbán de Córdoba. Tie, la membraro helpis kaj apogis unu la aliajn, same oni favoris la kolektivitan instruadon.



Eloy Vaquero Cantillo
Montalbán de Córdoba 1888
Novjorko 1960

Verdire la agado de Eloy Vaquero Cantillo kiel politikisto bezonus kompletan artikolon kaj pri li, ni parolos okaze de alia artikolo.

La unua projekto de Eloy Vaquero en la "Laborista Lernejo" estis krei instruon centron sub libera ĉielo. Li vojaĝis tra kelkaj eŭropaj landoj, tie li konis la sperton eduki infanojn en nefermitaj ĉambroj, tiel arboj, ĝardenoj kaj plantoj estis esencaj en la lernejo. En la jaro 1923 li verkis du librojn, "*Del Drama de Andalucía*" (Pri la dramo de Andaluzio), temas pri socia kroniko de tiuj jaroj en Andaluzio kaj "*Las Escuelas al Aire Libre*" (Lernejoj sub libera ĉielo), tie li rakontis siajn spertojn kiel direktoro de la laborista lernejo en Kordovo.


Eloy Vaquero estis bona amiko de Francisko Azorín Izquierdo, la ĉefa propagandisto de Esperanto en la urbo Kordovo dum tiuj jaroj. Ili kune organizis andaluzisman asembleon en Kordovo en la jaro 1918. Ili ankaŭ estis la ĉefaj redaktantoj de la "Manifesto de Kordovo", andaluzisma proklamo kiu celis konscienci la andaluzojn pri ilia politika estonteco. Sendube Azorín impulsis al Eloy Vaquero lerni la internacian lingvon. Tiel, tiutempa numero de la revuo "Esperanto" mencias la ekziston en la urbo Kordovo de laborista lernejo, kie oni instruas la internacian lingvon kaj kies direktoro estas samideano.

La internacia revuo elstaras alian informon, en la laborista lernejo oni aljuĝas monan premion, 25 pesetojn, al la plej bona lernanto de la lingvo esperanto, pagota en la monato

junio, kiam la kurso finiĝas. Pri tio mon-kvanto, oni devas diri, ke sendube temis pri sufiĉe granda monsumo, ĉefe por knabo, pensu, ke la monata salajro de la direktoro de la laborista lernejo estis 50 pesetoj.

En la jaro 1928 du novaj gravaj laboristaj societoj aliĝas al la laborista lernejo, temis pri la societoj de fervojistoj kaj panistoj. Tiam, Eloy Vaquero kontaktas kun sia amiko Francisco Azorín, profesie arkitekto, kun la celo pligrandigi la lernejon kaj atingi tiel, la kreon de vera instrua centro sub libera ĉielo. Azorín dezajnis instalaĵon kun apuda granda korto en la sidejo de la lernejo, en la strato Arroyo de San Lorenzo. En tiuj jaroj 170 knaboj ĉeestis la laboristan lernejon.

Bedaŭrinde la hispana civila milito haltigis tiun belan revon. En la komenco de tiu terura konflikto la lernejo ĉesis siajn agadojn, la novaj municipaj aŭtoritatoj instalas en tiu sama loko la publikan lernejon "San Lorenzo". Eloy Vaquero, kiu en la tempo de la respublika reĝimo fariĝis urbestro de la urbo kaj poste eĉ ministro en la jaroj 1934-35, ekziliigis, unue en Britio kaj poste en Venezuelon, Kubon kaj Usonon, tie li instruis hispanan literaturon en la Kolumbia Universitato, forpasis en Novjorko en la jaro 1960.



Plano por la konstruo de lernejo sub libera ĉielo en Kordovo fare de la arkitekto, kaj esperantisto, Francisko Azorín Izquierdo.



"Lernejoj sub libera ĉielo. Pura atmosfero, lumo, floroj por infanoj" de Eloy Vaquero Cantillo



La instruado meze de la ĝardeno estis ofta eduka rimedo en la Laborista Lernejo de Kordova.

Inaŭguro de la korto de la Laborista Lernejo de Kordova. Videblas en la grupo S-roj Vaquero Cantillo kaj Azorín Izquierdo.



En la Escuela Obrera.—El Inspector de Primera Enseñanza, Sr. Priego López, y el Director del Colegio Sr. Vaquero Cantillo, con los invitados al acto de inauguración del nuevo huerto anexo al Colegio, único al aire libre que existe en nuestra capital.



$E = mc^2$ *Sciencia Angulo*

La botiĥa efiko

Botiĥo estas neologismo koncerne al tio kio estas konata en esperanto kiel akvo-kruĉo aŭ beko-kruĉo. Ĝi estas ujo el pora bakita argilo, tradicia de Hispanio, kies celo estas enhavi akvon. La botiĥo havas la proprecon, ke ĝi malvarmigas la akvon, kiun ĝi enhavas. Kiel? Ene de ĝi troviĝas neniu artefarita malvarmigilo, do, kiamaniere la botiĥo malvarmigas la akvon?



*"Akvo pura en ujo natura",
jen admono en esperanto de
andaluzia botiĥo.*

Por klarigi tion estas necese diri, unue, ke la ceramikaj materialoj estas ege poraj. Tio estas, ili havas multajn porojn kaj tio faciligas la inteŝanĝado de gasoj el interne en eksteren de la ceramikaĵo, do, ankaŭ de la botiĥoj.

Tiel, ĉe la akva surfaco, tiu kiu tuŝas rekte la aeron, okazas forvaporiga procezo. Dum la vaporigo, la akvaj molekuloj rompas la ligojn kiuj unuigas unu kun aliaj, tiamaniere, tiu likva akvo fariĝas gaso, do vaporo. La rompado de tiu interligoj sorbas varmon, kiu ankaŭ foriras, tiel la etoso iomete malvarmiĝas.

La akvo-kruĉo ne estas fermita ceramikaĵo, kiel dirite temas pri pora materialo, krome ĝi havas du truojn, unu por trinki akvon, alia por verŝi akvon ene de ĝi. Tio faciligas la renovigon de la aero kaj malpliigas la humid-nivelo, ili ambaŭ estas bonaj kondiĉoj por rapida forvaporigo. Laŭ kalkuloj, estas necese konsumi 2,219 kilojulojn da energio -tio estas da kaloro- po unu gramo de akvo elvaporigita. Tiel, la forvaporigo konsumas la varman energion de la akvo de la botiĥo.

La funkciado de la akvo-kruĉo estas tute simila al tiu du de la procezo de la ŝvito en nia korpo. Ŝvito estas sekrecio eligita de homoj. Kiam la ŝvito troviĝas sur nia haŭto en rekta kontakto kun la aero, ĝi elvaporigas kaj tiu procezo konsumas iom da varmo. Tiamaniere nia korpo iomete malvarmiĝas.

Do, se botiĥo el ceramiko troviĝas en varma etoso kun malgranda humida nivelo, ties akvo ĉiam estos pli freŝa ol la ekstera temperaturo ekzistanta. Kaj ĉi tio sen nenia artefaritaĵo.



Principo de funkciado de botiĥo



Flamenko

El Pali kaj la seviljanoj de la kortoj

Fakuloj pri flamenka arto asertas, ke la seviljanoj¹ modernigis fine de la 19-a jarcento, kiam la sevila foiro popularigis ĉi tiun kantaĵon kaj dancadon. Kompreneble, tiu flamenka stilo ne naskiĝis tiam, verdire seviljanoj jam ekzistis en la 16-a jarcento, kiel evoluo de alia kastilia kant-stilo kiu poste flamenkiĝis en Andaluzio. Laŭ Manuel Machado, la seviljano estas gaja kaj milda koplo, kie vortoj eĉ dancas kaj ludas.

Post la jaro 1950, vinilaj diskoj diskonigis seviljanojn, aperis tiam aro da muzik-ensomboj en Andaluzio, ĉefe en Sevilo. Poste, dum la 8-a jardeko okazis granda eksplodo de ĉi tiu kant-stilo, multaj ensomboj kantis ilin dum foiroj kaj kermesoj, oni eldonis ankaŭ centojn da diskoj kun seviljanoj. En la jaro 1992 kin-direktoro Carlos Saura reĝisoris filmon kun la titolo "Sevillanas", kiu estas unu el la plej gravaj antologioj de ĉi tiu flamenka kantaĵo.

Kompreneble ne ekzistas nur unu konkreta stilo de seviljanoj. Tiel estas eble trovi kelkajn kiuj ade kantas al la Virgulino de l'Roso, aliaj al amo, al amikeco ktp. Unu el la plej antikvaj

branĉoj de la seviljanoj estas la tiel nomataj "kortaj seviljanoj". Temas pri tiuj kantaĵoj kiuj naskiĝis kaj divolviĝis en la kortoj, tiuj antikvaj spacoj ĉirkaŭitaj de konstruoj, el kiuj ĉambroj ricevis lumon kaj aeron. En Andaluzio kaj ĝuste en Sevilo, tiu spaco utilis ankaŭ kiel renkontejo de najbaruloj kaj tie ofte, oni kantis kaj dancis.

La plej konata aŭtoro kaj kantisto de tiuj "kortaj seviljanoj" estis Francisco Palacios Ortega, pli konata kiel *El Pali* (1928-1988). Li estis unue el la plej produktivaj verkistoj de seviljanoj en la dua duono de la pasinta jarcento. Li eldonis pli ol 20 diskojn kaj verkis 200 kanzonojn. *El Pali* revivigis la "kortaj seviljanoj" en la urbo Sevilo, kie jam apenaŭ ekzistis ĉi tiuj konstruaĵoj. Pro la fakto ke li kantis por memoriĝi antikvajn sevilajn kutimojn, li estis konata kiel "La Trobadoro de Sevilo". Lia karakteriza figuro, li havis dikajn okulvitrojn kaj ofte restis sidita dum horoj ĉe la pordo de sia hejmo, ankoraŭ estas memorata en la urbo Sevilo.

¹ *Seviljanoj estas gajaj kaj vivecaj kantaĵoj kaj dancadoj, eble la plej konata flamenka stilo.* 35



Francisco Palacios Ortega *El Pali*
1928 - 1988

SEVILO NASKIS INFANON

Aŭtoro: *El Pali*

I.

Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Ŝia nomo estas Triano,
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.

Ŝia nomo estas Triano,
ŝin baptis en la rivero
la ciganoj de l'kelo
ŝin baptis en la rivero
la ciganoj de l'kelo.

Kia granda bapto-festo
plena je abunda manĝado
elfluis vino kaj ridoj
tie lernis l'araboj
danci per bulerioj.

II.

Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Ŝia nomo estas Triano,
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.

Ŝia nomo estas Triano,
bapto-patro l'Ora Turo
kaj la patrin' la Hiraldo.
Bapto-patro l'Ora Turo
kaj la patrin' la Hiraldo.

Kia granda bapto-festo
plena je abunda manĝado
elfluis vino kaj ridoj
tie lernis l'araboj
danci per bulerioj.

III.

Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Ŝia nomo estas Triano,
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.

Ŝia nomo estas Triano.
Kartuzianoj kiel donacon
havigis blankan lavujon.
Kartuzianoj kiel donacon
havigis blankan lavujon.

Kia granda bapto-festo
plena je abunda manĝado
elfluis vino kaj ridoj
tie lernis l'araboj
danci per bulerioj.

IV.

Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Ŝia nomo estas Triano,
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.
Sevilo naskis infanon,
ŝia nomo estas Triano.

Ŝia nomo estas Triano,
Tie verŝis l'akvon sanktan
la pastro de Sankta Ana.
Tie verŝis l'akvon sanktan
la pastro de Sankta Ana.

Kia granda bapto-festo
plena je abunda manĝado
elfluis vino kaj ridoj
tie lernis l'araboj
danci per bulerioj.





Fervojista Angulo

La Kadiza "Trambahía"

Nova trajno trakuras la andaluziajn fervojojn, ĝi estas miksaĵo de trajno kaj tramo, ĉar ĝi trapasas urbajn kaj interurbajn spacojn, temas pri la tramo de la Kadiza Golfo, ankaŭ konata kiel "trambahía". La celo de ĉi tiu nova trafikservo estas kunligi kelkajn gravajn urbojn ĉirkaŭ Kadizo. La linio naskiĝas en la vilaĝo Chiclana kaj ĝi finiĝas en la urbo Kadizo. Entute ĝi etendiĝas tra 24 kilometroj kaj ĝi disponas pri 21 haltejoj.



La nova servo ebligas la transporton de centoj da homoj ĉiutage de la industriaj zonoj de Kadizo ĝis la lokoj kie ili loĝas kaj retroe. La nova linio trairas paralele la aŭtoŝoseon A-48, do, ĉi tiu trafik-servo volas eviti pli ol unu miliono da aŭtomobil-vojaĝoj jare. La vojaĝo daŭros proksimume duonhoron kaj ĝis 297 homoj povos uzi ĝin en ĉiu vojo.

Kiel dirite "trambahía" estas samtempe trajno kaj tramo. Tiel, kiam la veturilo eniras en urbon ĝi estas tramo trairanta stratojn je ne pli ol 30 kmoj/h. Inter urboj "trambahía" funkcios kiel trajno kun rapideco inter 75 kaj 100 kmoj/h. Rilate la relaro, ĝi havos iberan mezuron, tio estas 1.668 mmoj. Se paroli pri la trajnoj, estas necese elstari, ke temas pri la sola



trajno kiu iros ne sur metalaj radoj, sed sur kaŭĉuka materialo. Unuamomente, la servon plenumos tri trajnoj, la unua el ili konstruita en la fabriko de CAF en Irún (Gipusko), tamen la ceteraj alvenos el fabriko de tiu sama entrepreno en Linareso (Jaeno).

Kiel kuriozaĵo indas diri, ke RENFE, la hispana fervoja kompanio kiu mastrumas ĉi tiun linion, asignis novan cifere-serion al ĉi tiu trajno. Tiel la nombro 800 jam estis asignita de la hispana kompanio al tramoj, kaj ekde nun la nombro 801 signos la trajnojnfunkciantajn en Kadizo.



Hispana Amikaro de Fervojistoj
Esperantistaj

fervojista@esperanto.ac

Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto en Alora (Malago) super la rivero Guadalhorce. Jaro 2022

nun ni

junulara paĝo

INTERRAIL - INTERRELO

LA PLEJ BONA KAJ DAŬRIPOVA MANIERO VOJAĜI SENLIME

Kio estas Interrail ?

Interrail (en esperanto: Interrelo) estas internacia trajna bileto, kiu ebligas vojaĝadon tra tuta Eŭropo, dum preciza tempo-daŭro, de 4 tagoj ĝis 3 monatoj, sen la neceso aĉeti bileton por ĉiu vojaĝo. Ekzistas du malsimilaj Interrail-bilettoj:

- *Global Pass* (Tutgloba bileto): uzebla en 33 eŭropaj landoj. Ĝi estas taŭga por vojaĝi tra kelkaj aŭ multaj landoj en nia kontinento.

- *One Country Pass* (Bileto por unu lando) : uzebla nur en unu antaŭ-difinita lando. Taŭga por koni ĝisfunde unusolan landon.

Kiel Interrail funkcias?

Per interrail-dokumentoj vi rajtas preni kiun ajn trajnon, tiel ne estas necese aĉeti individuajn biletojn. Vi nur devos plenumi la necesajn datumojn sur la interrel-dokumentoj, tio estas, horon, fervojan linion, ktp. La revizoro petos al vi ĉi tiun dokumenton plenigitan por kontroli vian vojaĝon.

Tempo-daŭro

Estas necese sciigi pri du aferoj rilate al la tempo kiam oni rajtas uzi Interrelo.

- Valideco de Interrelo: temas pri la periodo dum kiu oni povas uzi ĝin. En la kategorio "Tutgloba bileto" tiu tempo-daŭro estas 3 monatoj; se "Bileto por unu lando" ĝi estos valida nur dum unu monato. Tio estas, se vi aĉetas la bileton la 15-an de junio, vi povos uzi ĝin ĝis la 15-a de julio. Tamen, ĉi tio ne sĝinifas, ke vi

rajtas uzi la bileton dum la tuta tempo, do, estas necese koni kio estas:

- Vojaĝ-tagoj: temas pri la tagoj dum kiuj vi rajtos uzi la bileton ene de la periodo de valideco. Ekzistas diversaj eblecoj, ju pli nombraj tagoj des pli multekosta estas la bileto. Tiel, vi povas aĉeti 4 5; 7; 10; 15; 22 tagojn kaj ankaŭ la tutan monaton. Tiel, se vi aĉetas la bileton en la kategorio "5 tagoj", vi povos uzi ĝin dum 5 tagoj, elekteblaj inter la tagoj de la valideco de Interrelo, do, estos la vojaĝanto mem kiu elektos la tagojn.

Se la vojaĝo okazas dumnokte ĝis la mateno de la sekvanta tago, oni ne kalkulas du tagojn por ĉi tiu vojaĝo, sed nur unu. Ofte oni bezonas rezervi lokbileton, ĉar estas necese rezervi sidlokon kaj ĉi tiu devigo validas ankaŭ por vojaĝantoj kun Interrelo.

Kiom kostas Interrelo ?

Interrelo estas uzebla de ĉiuj eŭropanoj, sendepende de aĝoj, tamen la prezo de la bileto estas malsimila laŭ la aĝo de la vojaĝanto. Jen ili por la jaro 2022 kaj por gejunuloj malpli ol 28 jaraĝaj:

"Tutgloba Bileto"

- Uzebla dum 4 tagoj en unu monato: 185 €
- Dum 5 tagoj en unu monato: 212 €
- Dum 7 tagoj en unu monato: 251 €
- Dum 10 tagoj en du monatoj: 301 €
- Dum 15 tagoj en du monatoj: 370€
- Dum 15 sinsekvaj tagoj: 332 €
- Dum 22 sinsekvaj tagoj: 389 €
- Dum unu kompleta monato: 503 €
- Dum du monatoj: 548 €
- Dum tri monatoj: 677 €

"Bileto por unu lando" la prezo malsimilas laŭ la elektata lando. Ekz. Italio:

- Dum 3 tagoj en unu monato: 105 €
- Dum 4 tagoj en unu monato: 126 €
- Dum 5 tagoj en unu monato: 146 €
- Dum 6 tagoj en unu monato: 164 €
- Dum 8 tagoj en unu monato: 198 €

Do, jen bona maniero vojaĝi tra 33 eŭropaj landoj en daŭripova transportilo.

Ĉu vi kuraĝas?

Kie: Sekreta laboratorio por la produktado de atomaj bomboj en Usono.

Kiam? Varma vespero de la monato julio en la jaro 1946-a.

Sinjoro Paul Arnold estas nuklea fizikisto. Li eliras el sia oficejo, li gardas siajn labor-instrumentojn, li faldas ĵurnalon sub sia brako, li markas sian eliron en horloĝo kaj li fine trapasas duoblan sekurecan kontrolon antaŭ ol eniri en aŭtomobil-parkejon, ĉi-ĉion li faris miloj da fojoj dum la lastaj jaroj. Li estas tre bone konsiderita en la laboratorio, tamen hodiaŭ io estas malsimila...

Paul Arnold estas

ATOM- BOMBA Ŝtelisto !!!





Malfermu,
Karl! Jen mi



Ek! Fermu la pordon!
Jen la skizoj.
Ĉu vi havas
ilin?



Jen ili, kaŝitaj en
mia ĉapelo.

Ĉi tiu estas la lasta peco
de la puzlo. Ni jam scias
kiel konstrui la maŝinon
por izoli la izotopon
U-235.



Alivorte,
ni povas
konstrui atom-
bombon!

Jes, Paul, ĉi tiu estis longa kaj
peza laboro. Bonŝance vi sukcesis
eltiri ĉiujn informojn de la
laboratorio dum la pasintaj
jaroj.



Jes, peza tasko! Mi
estas tute certa, ke
multaj landoj pagos
miliojn por posedi
ĉi tiujn planojn

Tutcerte! La prezo eĉ
plialtiĝos se la militistoj
sukcesas dum la testoj de
la venontaj tagoj en la
Pacifika Oceano. Ni atingos
grandajn profitojn se ĉio
iras enorde.

Vi detruis
komplete la
pruvojn,
ĉu ne?

Ja ĉiujn!
Escepte la
planojn kiuj
estas en ĉi tiu
valizeto.



Mi aranĝis kelkajn
renkontojn kun ekster-
landaj agentoj en sek-
reta punkto.

Ni atingos pli altan sumon
se ili pliproponas unu post
la alia. Jen nia aviadilo, la
cisterno estas plena, ni
ĝuos dum nia ĉas-tago.



Nun, ĉio estas en-orde,
ni fuĝis sukcese!

Ha! Amuze! En la
laboratorio ĉiuj pen-
sos, ke la kulpantoj estis
antikvaj kunlaborantoj.
Jen ni, du gutoj en la
oĉeano!



Do, skizoj de la atom-bomba projekto eliris unuafoje de la laboratorio. Ili flugas nun ene de rapida aviadilo super la Pacifika Oĉeano.



Post 24 horoj ni havos milio-
nojn da dolaroj en la poŝoj.

Ha!



Diru, Karl!
Kion vi faros
kun via parto de
la mono?



Mi ne ŝatas diri
ĉi tion, Paul...la
mono ne dividiĝos.

Kion?





Idioto! Vi pafis kontraŭ la kontroloilojn. Nun, ni falos en la maron!



Ve!! Vi trompis min!



Ni mortos!
Ni mortos!



SPANG!



Ni sinkas. Bonŝance la sav-boato funkcias. Nun la valizeto. Paul, mi estas vundita!



Paul, ne lasu min ĉi tie. Mia vundo ege sangas. Helpu min!

Vi tion diris: ne eblas dividi.

La aviadilo mergiĝis.
Ne lasu min ĉi tie,
prenu mian monon

Dankon, multan
dankon. Ĝis revido
en Kalifornio!
Haha!!

Paul, helpu min
supreniri en la
boaton.
Helpon!

BLAM!

Ve!

Vi dronu!
aŭ la venonta
kuglo trapasos
vian kapon.

Mi sangegas.
Helpu min!

Ne tro fore, la verŝita sango estis
flarita de la sentiva nazo de la
tigro de la oceanoj: Ŝarko !

Paul, venas...ŝarko, ŝarko!
Hel...

Mi malbenas vin,
Paul !

Brrr!

Tiel, Paul restis
sola, meze de la
oceano kun armilo
kaj valizeto, ene
de ĝi la sekreto de
la atom-bombo
kaj la promeso de
milionoj da dolaroj,
sed ĉirkaŭigita nur
de sala akvo.

Post kelkaj tagoj, sub terura suno kaj kun altaj ondoj, Paul Arnold sentis strangan sensacon. La sav-boato tuŝis sablan plaĝon.



Nur unu viro vivis kun la sekreto de la atom-bombo, nur unu homo gajnos milionojn dank'al tiu sekreto. Akvon, sunon...



Insulon! Mi vidas insulon!



Jes, nur mi gajnos milionojn, milionoj da dolaroj nur por mi, milionoj da dolaroj... miaj, nur miaj



Akvo!!
Dolĉa akvo!!
Akvo!!



Nu, kio estas ĉi ĉio? Kelkaj bestoj staligitaj... al kiu ili apartenas?



Strange! Kaproj kaj porkoj. Nu, mi ne malsatos, mi ankaŭ disponas pri akvo.



Nu, ĉi tie homoj loĝis sed ĉio restas en silento, morta silento.





Andaluza Kuirarto

Melongenoj kun melaso

Melongeneno estas legomo kiu produktas grandajn frutojn, ĝenerale ili estas violkoloraj aŭ ankaŭ blankaj. Araboj enirigis melongenon en la Iberan Duoninsulon, siafoje ili konis ĉi tiun legomon pro siaj vojaĝoj en Hindion. En libro verkita inter la jaroj 1043 kaj 1075 de la sevila *Abu Zacaria Ihaia*, unu el ties ĉapitro temas pri la semado de melongenoj. La aŭtoro ankaŭ skribas pri la kuirado de ĉi tiu bongusta legomo. *Abu Zacaria* jam avertas, ke estas necese enmeti en likvon, prefere akvo kun salo, la melongenon se ĝi estas tranĉita, por eviti tiel sian ennegriĝon.



Melongeneno

Hodiaŭ ni parolos pri tipa andaluza recepto, melongenoj kun melaso. Temas pri frandinda recepto tre konata en Andaluzio, kun evidenta araba origino, kie intermiksiĝas legomo sale kuirita kun la dolĉa bruna

siropo, la lasta likvo atingita post la suker-fabrikado.

Jen la ingredientoj

- Du melongenoj.
- Faruno 50 gramoj.
- Melaso.
- Oliv-oleo 150 ml.
- Salo
- Kelka likvo kiel biero, lakto aŭ gasakvo.



Faruno



Oliv-oleo



Salo



Melaso

Sukerkana mielo



Biero



Lakto



Gasakvo

Kaj jen la preparado:

1) Lavu du melongenojn. Distranĉu ilin en bastonetojn aŭ en maldikajn disketojn. Metu ilin ene de potu kun likvo, ekz. biero, lakto aŭ gasakvo (karbonata akvo). La celo estas mergi la tranĉitajn melongenojn ene de likvo por eviti la rapidan oksidiĝon, do, ties ennigriĝon.



2) Post kelkaj minutoj, demetu ilin en la likvo (biero, lakto aŭ gasakvo). Tiam ŝmiru ilin per faruno. Kiam ili estos kovritaj de faruno, skuu ilin, tiel restos nur maldika tavolo da faruno sur la distranĉitaj melongenoj.



3) Enmetu ilin de varma kaj abunda oleo por friti ilin. Fritu ilin leĝere.



4) Demetu ilin el la pato. Ili devas ripozi dum kelkaj sekundoj sur kuireja papero por eligi oleon.

5) Jam sur telero verŝu melason (sukerkanan mielon) sur la melongenojn.



Ĉi tiu kuirajo devas iri rapide el la pato en la tablon.

BONAN APETITON !



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Fantomo ĉe la Teatro Cervantes en Almerio

En la jaro 1921 estis inaŭgurita en la urbo Almerio la teatro *Cervantes*. En la jaro 1922 impresario aranĝis la prezentadon en la teatro de tiutempa fama verko "Santa Isabel de Ceres". Ĉi tiu teatro-verko pritraktis la vivon de prostituitinoj en bordeloj, evidente, en la tiama Hispanio ĉi tiu verko ŝajnis esti ne-deca, eble pro tio la intereso ĉeesti la spektaklon pligrandiĝis en la urbo. La premiero okazis la 21-an de januaro 1922, laŭ reklamoj la reprezentado estus tiel bone aranĝita, ke eĉ pafoj sur la scenejo ŝajnas esti realaj.

Ludis en tiu premiero *Concepción Robles Pérez*, pli konata kiel *Conchita Robles*, bela kaj talenka aktorino kiu revenis en sian urbon Almerion. Edzo de *Conchita* estis *Carlos Verdugo*, kavaleria komandanto en Granado, tre ĵaluzema viro kiu aŭdis onidiraĵojn pri ebla am-rilato inter *Conchita Robles* kaj alia aktoro de la trupo. Eble pro tiu rilato ŝi postulis antaŭtempe laŭleĝan separos de la geedzoj, en tiuj jaroj divorco ne estis laŭleĝa en Hispanio.

Conchita Robles multe timis la eblan alveno de la edzo, do, ŝi petis al la pordisto de la teatro tute malpermesi



al li eniri se ili fine aperis por vidi la spektaklon. Fine, *Carlos Verdugo* venis kaj li sukcesis trompi la pordiston, kun la preteksto, ke li estis grava impresario kiu deziris dungi la ĉefrolulinon.



Conchita Robles, almeria aktorino

Edzo kaŝis sin post la scenejo, tie li povus renkonti ŝin okaze de reiro al tualetejo post la unua sceno. Tio baldaŭ okazis kaj la edzo jam tenis pafilon enmane. Kiam *Conchita* vidis sian edzon, ŝi ŝirmis sin post juna laboristo de la teatro, *Manuel Aguilar* 16-jaraĝa respondeculo pri la afiŝaro de la teatro. Malgraŭ tio *Carlos Verdugo* pafis ses-foje, li vundis ambaŭ ilin. Publika ĉeestanta la teatron aplaudis, verdire la propagando pravis kiam oni asertis, ke pafado dum la reprezentado ŝajnus esti reala. Tiam, la juna *Manuel Aguilar* venis en la scenejon, tie li

ekkriis, ke la pafoj estis realaj. Ĉiuj ĉeestantoj en la teatro tuj forfuĝis, dum kuracisto supreniris en la scenejon por helpi la vunditojn.

Siafoje, *Carlos Verdugo* metis la pafilon apud sia kapo kaj li pafis, tamen li ne sukcesis mortigi sin, li nur perdis dekstran okulon. *Conchita* mortis kaj ankaŭ la junulo post kelkaj horoj en la hospitalo. Post jura procezo la edzo, oni kondamnis la murdiston al du porvivaj enkarcerigoj.


Dek kvin mil homoj ĉeestis la entombigon de *Conchita* kaj *Manuel*. Samtempe en la teatro *Cervantes* ekokazis strangaj fenomenoj. Kin-filmadisto vidis sur spegulo bildon de virino kun fulardo sur la kapo, tamen antaŭ la spegulo neniu staris. Alian fojon, tiu sama virino estis vidata sidita ĉe la galerio antaŭ la komenco de spektaklo. Kiam respondeculo demandis al pordisto kial li permesis tiun virinon antaŭ la komenco, li asertis, ke neniu eniris. Alian tagon, laboristo persekutis virinon kiun li vidis post la scenejo, sed ŝi forvaporiĝis.

Alia laboristo asertis, ke estis eble aŭskulti paŝojn kaj susuroj en senhomaj ĉambroj, kie lampoj aperis ree ŝaltitaj kaj poste malŝaltitaj. La plej terura evento okazis en la jaro 1940, tiam teatro-maŝinisto pendumis sin per ŝnuro sur la scenejo. En Almerio oni diras, ke la spirito de *Conchita*, kiu forpasis kun granda doloro en la teatro, ankoraŭ restas tie.

Vorto-Ludoj



Krucvorto




HORIZONTALE

- A. (*Plurale*) Infloresko, densa spiko ofte konussimila, kies unuseksaj floroj defalas unubloke.
- B. Laŭ la astrologia tradicio, la ŝajna vojo de Suno tra la 12 signoj.
- C. Moviĝi direkte al iu aŭ io. ■ Trovebla sur la aviadiloj de Unuiĝinta Reĝlando. ■ Same sur la aŭtomobiloj de Norvegio.
- Ĉ. (*Inverse*) Rilata al tempo, dum kiu la suno estas sub la horizonto kaj ne prilumas. ■ Ronda vokalo.
- D. (*Sen la lasta vokalo*) Io skribita laŭ sia definitivan skribformo ■ (*Sen la lasta vokalo*) Duonlarĝa bordero.
- E. Kemia elemento. ■ En kiu loko?
- F. (*Inverse kaj plurale*) Parto de la tago ekde la sunleviĝo ĝis la tagmezo.

VERTIKALE

1. Anoj de la plej granda kontinento.
2. Miksaĵo de kalko kun sablo, per kiu oni kunigas la brikojn de muro.
3. (*Inverse*) En Romo, dekreto de pretoro aŭ de la imperiestro.
4. Vi kaj mi. ■ Vokalo. ■ En la hispanaj aŭtomobiloj.
5. (*Sen la lasta vokalo*) Daŭro de 24 horoj.
6. Numeralo. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Unujaraj herboj kun 2-floraj spiketoj en paniklo kultivataj por ornamo.
7. (*Inverse kaj plurale*) Frukto granda kiel homa kapo kaj kun sukplena karno maturstadio blanka, flava, flave oranĝa aŭ verda

Lingva Vojaĝo



Ĉu vi kapablas vojaĝi de Ajamonto ĝis Mohakaro uzante nur vortojn?

Temas pri facila vojaĝo. Por solvi ĉi tiun enigmon vi devos nur diveni la kaŝitajn vortojn. Memoru, ke vi rajtas ŝanĝi nur unu literon en ĉiu paŝo.

AJAMONTO: la plej okcidenta urbo en Andaluzio.

----- : Hereda ordo, laŭ kiu la plej maljuna filo heredas la familian bienon kaj difinitajn rajtojn.

----- : Tiu, kiu seksumas kun la celo havigi plezuron al si kaj al sia(j) partnero(j).

----- : Homo, konsideranta sin solidara kun la tuta homaro.

MOHAKARO: la plej orienta urbo en Andaluzio.

*Se vi kapablis solvi ĉi tiujn vorto-ludojn, sendu vian solvon al jena ret-adreso:
cordoba@esperanto.ac*

SOLVOJ AL LA PASINTAJ KRUCVORTO KAJ REBUSO

	1	2	3	4	5	6	7
A	F	A	B	R	I	K	O
B	E	S	E	I	S	T	O
C	K	E		K	A	P	R
Ĉ	U	S		O	K		E
D	N	O	I	L		A	H
E	D	R	A	T	O	N	
F	A	O	R	I	S	T	O

REBUSO

Kiuj estris post la revolucio? *Insurgentoj*

Sur la bildo aperas Virino (ino aŭ in') sur la nomoj de kelkaj famaj gentoj (Kennedy, Rotschild ktp). Gento estas grupo el pluraj familioj, posteularo de unu sama praulo. Do, *In' sur gentoj* = *Insurgentoj*.

HUMURO



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

Estraro

Prezidanto / Presidente:
Vicepresidente / Vicepresidanto:
Sekretario / Secretario:
Kasisto / Cajero:
Voĉdonantoj / Vocales:

Directiva

Ángel Arquillos López
Fátima Jiménez García
José M^a Rodríguez Hernández
M^a Dolores Torres Mateo
Jordi Lietor López
Juan García del Río
Carlos Spinola
Alejandro Burgos Escalante
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)
TTT-paĝo / Página web: www.esperanto.ac
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: www.esperanto.es
Asociación Universal de Esperanto: www.uea.org



Alfabeto



Aviadilo



Birdo



Citrono



Ĉevalo



Domo



Elefanto



Fiŝo



Glavo



Ĝirafo



Hundo



Ĥameleono



Insulo



Jogurto



Ĵurnalo



Kokino



Libro



Mano



Neĝo



Okulvitroj



Pomo



Rozo



Serpento



Ŝuoj



Trajno



Urso



Aŭto



Valizo



Zebro